



LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 127 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. Januaro 1931.

VIKTIMOJ.

originalo de Julio Baghy 237p. 4/- kaj
6/- ĉe B.E.A.

Ne multaj legantoj de Esperanto-literaturo kontraŭdirus aserton, ke ĉi tiu romano de nia hungara majstro rajte prenas lokon inter la kelk-dudeko da originale verkitaĵoj libroj, kiuj ial aŭ iel povus pretendi al konvena komparo, el vidpunkto de literatura valoro, kun konataj nacilingvaj verkoj.

Sajnas, ke la Esp. verkistoj pli-malpli nete grupiĝas sub du stilkategorioj. Estas la klasikuloj, ĉizistoj de belritmaj, velure sonantaj frazoj iom longaj, kiujn ili verkas laŭ preskaŭ timeme korekta sintakso kaj gramatiko, laŭ rigida vortkunmeta leĝo. Tiaj plumistoj mortpaliĝus je nura ekpenso naski monstretrojn, kiaj amgeo (paro de amantoj), pirido (juna pireto), ielare (laŭ multe da diversaj manieroj). Ni tenas en penso sinjorojn Luyken, Bulthuis kaj Payson.

Aliflanke laboras la vortludistoj, la jonglistoj de l' lingvaĵo. la kreistoj de l' ĉiamnove bezonata esprimmaterialo kaj -maniero. turj, kiuj volus ĝislime streĉu la elastecon de nia mirakle fleksebla lingvo. Ĉu ni ne indikas la tradukinton de "La Cikoni-Kalifo," Jean Forge. R. Schwartz kaj Julio Baghy? Interese estus scii kiu el la du tendencoj pli forte influas sur la Esp. leteraron.

Kia aparta literatura merito povigis, ke Viktimoj atingu vivon en dua eldono? Ĉu pro tio, ke ĝi estas la plej faminda el tiu mikso da soldata psikologio kaj ĉefronta hororo, kion oni nomas la primilita romanaro? Ne: mankas el ĝi multo nepre ĉusta en tiaspecaj verkoj: forestas, feliĉe por la sentemulo, la soinfrostiga realeco de l' fumeza batalaĵo, tiel korŝire priskribita en "En Okcidento Nenio Nova." Anstataŭ la

teruraĵoj de la korpo frakasado, ni sentas la koron dolore salti pro kompatato al homoj luktantaj en anima turmento. Ni vagas tra la premaera barakaro de l' militkaptitoj, lokita en intern-Ruslando; ni rigardas en la samurban teatron, en kiu ludas la ĉeĥaj aktoramaratoroj, iagrade indulgitaĵ malliberuloj.

La kerno de la libro estas la majstre disvolvita historio de la malfeliĉa edzino de prokuroro Mozorov, Katja, jam de ŝia junulina aĝo servute fi-traktita de l' viraĉa speco, kontraŭ kiu ŝi detruas militas per la plena forto de sia volupta kaj malica naturo. Sed iam ŝi renkontas Johanon Doŝky, ĉeĥa elpatrujigito. Lin la feroĉa Katja tente amaĵ-celas. Tordita ne nur de memoro al edzino en fora Ĉeĥujo sed ankaŭ de lia amo al la por li kompatinda prokuroredzino, li batalas ĝis venko kontraŭ ŝiaj allogoj. Sajnas, ke la interna batalo hardas lin ĝis tio, ke li farigas preskaŭ sanktulo, sub kies bona influo Katja karaktere ŝanĝiĝadas de homtigrino en spirite ĉastan virinon, purigitan de la neatendita konduto de unu virhomo. Johano sukcesas montri al ŝi "la templopordon de ŝia animo." la belan vojon de l' vivo. Jam de tiam ŝi rifuzas plu konsenti al naŭzmoralaj artifiĵoj de sia riĉoficema edzo. La sceno en la karcero, kie Doŝky alvizaĝas la rikanmokan Mozorov, kiel starus fruepok-kristana martiro antaŭ leonoj; la pitoreska figuro de la altruista armeservistino Fiza, kaj de la komika marĉandisto Izur, estas ne facile forgeseblaj; ĉu pro tio, ke Baghy reproduktis ilin el la pivanthomaj fotografaĵoj preniĝintaj en la galeriojn de lia cerbo dum la jaroj de la militteruro?

"Taŭzita vizaĝo," "mucida rideto" estas strangaj; 122 furoro (uzita en senco "kolerego" nebone); 24/25 subunga sincereco; 229 vastaj vortoj; 60 Prenu la pantalonon kaj punkto (?); 212, Ne prenu mian menson (Ne frene-

Part could well form the groundwork for elevation to the literary dignity of essays.

Mr. Adcock urges acceptance of Esperanto. He asserts that the sentiment of nationality has been based on community of language far more than on anything else. Racial origin, in comparison, is almost a negligible factor. With peoples, social heredity is far more important than physical heredity. Culture is inherited more than blood, and culture is bound up inseparably with language. If we are to have an internationalism with a real, solid, cultural basis, we must have an inter-language.

We congratulate our samcelano on his enterprise, and trust that with his next work he may be more felicitous in his choice of a proof reader.

Price, 2/6. Copies from C. J. Adcock, Drury, Auckland, N.Z.

KRONIKO.

Wellington, N.Z.—There was a large attendance at the social evening of the Wellington Esperanto Club, which took place 16/11/30 in the Y.M.C.A., Willis street, Mr. E. C. Jack presiding. The function marked the close of the club's activities for the year. The re-opening date will be 27th January.

H. King next contributed an amusing Esperanto item, "La Loterio." Mr. L. E. Dust presented an original monologue in Esperanto, entitled "La Plumisto."

The concluding item was an original Esperanto one-scene sketch, "La Vilaĝa Policano," presented by Miss Coralie Smythson, Mr. V. Leck, Masters Adrian and Malcolm Potts, and the club secretary.

This enjoyable program was closed with a supper, during which Miss Bland recited "New Zealand—My Homeland." ("Post" 17/11/30).

Perth, W.A.—La jarkunveno de la Westralian Esperanto Society okazis la 4an de dec-o. La pasintjaran raporton legis la sek-iino. Iom post iom la membraro plimultiĝas. F-inoj M. Miller, Gibson kaj Griffin gajnis la unuan (elementan? Red.) ateston de la B.E.A., la du lastaj kun honoro.

Pro transloĝigo for de Perth nia sek-iino, s-ino E. Sainsbury, devis eksiĝi sian oficon, kiun f-ino E. Griffin anstataŭe prenis. La tuta ĉeestantaro esprimis tutkoran laŭdon pro la valora laboro de s-ino Sainsbury kaj veran bedaŭron pro ŝia abdiko. S-ro H. Byatt estis elektita unuvoĉe prezidanto, kaj s-ro A. Saar vic-prezidanto. La

TRE URĜE! REABONU VI POR 1931

A special welcome was extended to Mr. Joseph Major, a Continental Esperantist, who had that morning arrived in New Zealand. Mr. Major, who spoke in Esperanto, referred to the great progress of Esperanto, and congratulated the club on its pronunciation of the language, which was quite equal to Continental standard.

Miss G. Garty contributed a piano-forte solo, "Selections from Schumann." Mr. W. L. Edmanson recited in English "Unlucky Dick." An entertaining sketch entitled "F-ino Kolerema" was capably presented in Esperanto by Misses I. and C. Smythson and Mrs. Bertram Potts.

A pianoforte solo, "Nocturne in G," by Chopin, was given by Miss E. Duguid, which was followed by an original monologue in Esperanto by the secretary, Mr. Bertram Potts, entitled "La Aŭtoro skribas Leteron." Mr. W.

komitatanoj de nun estas f-ino Byatt, s-roj Casey kaj Miller.

Anoj alestis multnombre kaj manifestis fortan intereson pri la afer-pitrako. Precipe rimarkinda estis informo donita de la sek-iino, ke la societo jam havas kvardek librojn por proponita biblioteko. Konsilinde estas, ke ĉiu grupo posedu kolekton da purstilaj Esp. verkoj.

Entute ni pravas esperi al sukcesriĉa novjaro. Tion ĉi spertu ĉiuj Esp. rondoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando, ankaŭ en la tuta mondo.

La anaro ĉeestis vespere por adiaŭi s-inon Sainsbury. S-ro Casey esprimis al la gasto elkorajn bondezirojn nome de la geanoj kaj dankis ŝin pro ŝia sindonema laboro. Por montri al la sinjorino kiel la tuta anaro sentis pri ŝia senlaca servado sekretariina, s-ro Casey pere donacis al ŝi lede binditan libron, kiel memoraĵon de kunlaborantoj.

Sinjorino Sainsbury trafe respondis kaj dankis la anojn, dirante, ke ŝi nur faris sian eblon, same kiel ĉiu seriozulo penadas por disvastigi nian lingvon. Post iom da muziko kaj ludoj la ĉeestantoj ride kunbabiladis antaŭ vespermanĝo kaj gaja foriro. Dimanĉon, s-ro Colin Unwin bonkore invitis la geanojn viziti lin ĉe lia semajnfina dometo en la montetoj. Multaj samideanoj tien iris por ĝui la gastemecon de s-ro Unwin. Plejparte la vizitantoj kaptis la okazon por sin ekzerci je nia lingvo. Tutkore ni dankas al la s-ro pro lia afableco.

Melburno, Vik. — S-ro C. Ballard ĉeklube rakontis pri dusemajna ferio, kiun li faris en novembro. Lasinte Melburnon aŭtomobile li ĝisiris al Bairnsdale kaj poste la ĉarma Lakes Entrance, kie li tranoktis. Sekvintmatene li atingis Nowa kaj la indiĝenan rezervejon ĉe Lake Tyers. Ĉe Rivero Cann tagmanĝinte, li alvenis al Genoa kaj Twofold Bay, kie oni industrie kaptas balenojn. Li vizitis Narooma, pitoreskan lokon, ankaŭ Nowra, apud Rivero Shoalhaven. Ĉe Bega sidas soldata memorŝtono, iom simila al la Arc de Triomphe en Parizo. Elirinte Wallengong, li baldaŭ trafis Sidnejon, kie li paslogis 2-3 tagojn. Li priskribis tieajn konstruaĵojn, kaj viziton al la Jenolan Kavernoj. Helpe de fotografiaĵoj li bone ilustris la atentotiran paroladon.

F-ino Sinnotte kaj la anoj de ŝia grupo vizitis la Melb. Esp. Soc. en ties nova ĉambro, kaj ĉiuj spertis feliĉan vesperon.

F-ino Cox, kiu feris en novembro, rakontis al klubanoj iom pri sia ekskurso. Per multo da fotografiaĵoj, ŝi montris al anoj la belecon de Adelaide, kaj la interesriĉan veturon sur Rivero Murray ĝis Mildura. Mallonge restante ĉe Berri, Renmark kaj Wentworth, pasaĝeroj travagis la urbojn elserĉante interesaĵojn. Post dutagresto en Mildura, nestanta meze de oranĝarbe vestitaj teroj, vinberejoj kaj konstruaĵoj por pak- kaj ekspedado de fruktoj, f-ino Cox revenis Melburnon.

INFORMO AL PUBLIKO.

La Suda Kruco estas presita ĉiunmonate en nombro 400. Oni dise sendas 250 al diversaj partoj de la mondo. Tri fojojn en la jaro oni presas po 600, por ekstra ekspedo al anoj de la Nov-Zelanda Esp. Asocio, kiel ĉi ties bul-teno.

TO OUR SUPPORTERS.

Many thanks for their encouragement through the past year! May 1931, in spite of inevitable difficulties that lie in it, mark a further consolidation of "La Suda Kruco" as the organ of a healthy, progressive fellowship of Australian Esperantists. We acknowledge the following:

Mr. A. Saar, 5/-, julio '31; Mr. J. Sayers, 4/6, dec. '31; Mr. G. Woodhall, 5/-, dec. '31; Mr. C. Ballard, 9/-, dec. '32; Dr. F. Williams, 4/6, dec. '31; Mr. W. Waterman, 4/6, dec. '32; f-ino W. Trundle, 4/6, nov. '31; Sales 8d. Ensume: £1/17/8.

KURSO PER TRADUKADO

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.; sek-iino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.)

TRADUKO 14

KAPITANO CHARLES STURT

.... Aŭtoro kaj Landesploristo.
(daŭrigata)

Fine (1) ili atingis la riveron (2) Darling ĉe loko en distanco de naŭdek mejloj de tie, kie ili la unuan fojon ĝin vidis kaj pli supre de la rivero. Sturt ĉagreniĝis trovante ĝin ankoraŭ sala. Esplorado de la ĉirkaŭa tero pli mal-kuraĝigis Sturt-on, kaj antaŭ ol returne (14) ekiri li skribis en sia taglibro, ke la tutan tagon ili vidis "nek folion da (3) herbo nek guton da (3) freŝa akvo. Ni ne plu (4) vidis postesignojn de indiĝenoj. La regiono ŝajne estas dezerto, kiun tiuj neniam eniris, kaj en kiu ne troviĝas eĉ birdo."

Ankoraŭ restis mistero, ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas internlanda maro, kaj en la jaro mil-okcent-dudek-naŭa Sturt jam (5) nun estro de bone ekipita ekspedicio, denove turnis la vizaĝon al la internlando, havante kun si George MacLeay-on (pron. ĝorĝ mak-lej) kiel subestron. En la daŭro de kelke da (6) tagoj ili marŝis flanke de la rivero Murrumbidgee (pron. morom-biĝe) sed kanoj kaj marĉoj ankoraŭ unu fojon (15) malebligis ilin, iri pluen sur seka tero. Ili kunmetis (7) la partojn de la balena boato kaj faris boate-ton, kaj je la sepa horo en la mateno de la sepa de Januaro la sep homoj de la Sturt'a ekspedicio komencis sian epopean boatvojaĝadon sur riveroj. La sekvintan tagon (8) dronis la boato kune kun la manĝaĵoj (9). Savinte tion, kiom ili nur (10) povis, ili pluen remis kaj post unu semajno rapide por-

tigis en largan, imponan riveron. Sturt sentis, ke fine li ricevis rekompencon por ĉiuj siaj penadoj kaj ĉagrenoj. Li nomis la riveron Murray (pron. morej) laŭ la nomo de Sir George Murray. Post ne longe minacis (11) ilin malamikaj indiĝenoj, kaj sangoverŝo ne okazis (11) nur pro ĝustatempa interveno de kvar aliaj indiĝenoj, kiujn jam antaŭe Sturt traktis bonkore. Post tri semajnoj la malgranda ekspedicio, kun preskaŭ elĉerpitaj fortoj pro senĉesa remado, vidis la finon de la rivero, kiu fluas en lagon, kiun li nomis Alexandrina. La fino ne estis tia, kian esperis Sturt, kiu skribis: "pro tio (12), ke tajdoj tiel malmulte influis (11) la lagon, mi tuj vidis, ke verŝajne ni ne povus trovi praktikan komunikejon kun la oceano." Nenio farebla krom tio, returne (14) veturi laŭ la malfacilega vojo de ilia veno. Ĝia sukceso estas senmorta atesto al la lerta estreco de Sturt. Kvankam ĉiuj estis malfortigitaj de senŝirmeco, malsato kaj troa laboro, tamen neniu murmuris. Unu el la remistoj, pensante, ke Sturt dormas (13), diris, "mi devas morgaŭ sciigi al la kapitano, ke mi ne plu (4) povas remi." Tion li diris, tamen la morgaŭan tagon li remis ĝuste kiel antaŭe. La laŭdado de posteuloj estis la unua honoro al tiu heroo. Li estis punlaborulo, kaj oni remetis lin en malliberecon post kiam la bravegaj ekspedicianoj, malgraŭ malsano kaj malsato, trabatis al si vojon al civilizejo por sperti sendankecon. Eĉ Sturt'on mem oni sendis (11) kun lia regimento al New Norfolk (pron. nju norfok), kie la malseketa klimato pli malsanigis lin. En la jaro mil-okcent-tridek-kvara Sturt, preskaŭ blinda, returne (14) iris Anglujon (2), kaj tie publikigis sian unuan libron. En la jaro mil-okcent-tridek-kvara, post tempo de tuta blindeco, vidkapablo iom post iom revenis al li. Li edziĝis al Charlotte Green (pron. ŝarlot grijn) en Dover.

En mil-okcent-kvardek-kvar Sturt denove sin trovis en Aŭstralio kiel komisaro de ŝtataj teroj kun definitiva instrukcio, esplori la mezon de Aŭstralio. (daŭrigota).

NOTARO 14.

1. "Fine" (ne "eventuale").—2. Akuzativo de loko, al kiu oni iras. Cox 68 (3b).—3. Ĉi tie "folio" kaj "guto" havas figuran sencon de mezuro, tial "da".—4. "ne plu" aŭ "jam

ne." L.R. pĝ 65.—5. "jam" ĉi tie akcentas la ŝanĝon, ĉar la antaŭa ekspedicio estis nebone ekipita. La Angla ekvivalento estas akcentata "now".—6. "kelke da". Notaro 11/2.—7. Rimarku la konstruon kun aktiva verbo por eviti pasivan formon kun kunmetita tempo (boato estis konstruita).—8. Cox 68 (3b).—9. Eble ĉi tie "provisions" havas pli vastan signifon ol "manĝaĵoj".—10. "nur" antaŭ "povis" signifas, ke la ago estis ĝis la limo de la povo (as much as ever they could). Kp. F.K. 114/9, Gen. 44/1. Mart. 96/6, 140/17.—11. Vidu noton 7.—12. "pro tio, ke" aŭ "ĉar" aŭ "tial ke".—13. "dormas" (ne "dormis") Cox 219, 221.—14. Zam. ĉiam uzas "returne" (ne "returnen") ĉar la vorto mem enhavas la ideon de almovo. Vidu F.K. 63/13, 145/6, Gen. 43/12.—15. "ankoraŭ unu tojon," once more, yet again.

PLI DA RESPEKTO!

"Adreslibro de filatelistoj," eldonita de Ladislao Lekowski, Piastow, a/Varsovio, 32p. 2ŝ. Ĉi tiu libro por poŝtmarkuloj estas honta ekzemplo de komencula fuŝo. Plejparte pollingva. La Esp. parto presere plenplenas; manke ĉapelhavan literaron la eldoninto ignoris la Zamenhofan anstataŭilon (la postan h, aŭ apostrofon), uzante haosrezulte nur la simplajn literojn. Oni promesas netan duan eldonon. Espereble oni atingos tion! Sinjoro L. eldononta direktu la okulojn sur la modele redaktatan Tutmonda Kolektanto anoncitan en nia septembra numero. Ni respektu nian lingvon! (Robo)

ESPERANTO POR INFANOJ.

Dediĉita al la infanoj de la mondo, ĉi tiu eldonaĵo estas ĝustpriskribe leglibreto por komencantoj. Ne utile uzebla seninstruiste; memlernanto devas studi ĝin kun gramatiko. En ĝi troviĝas nenia priregula klarigo, oni renkontas nenie kunmetitan verbotempon. La komencaj ĉapitroj titoliĝas jene: zemple: La Verda Pomo, La Porkoj Poste la aŭtoro donas pli da celhaveco, nomante ilin, "leciono pri -ej -il" k.c. Neŝuste lokmetita inter lecionoj pri zifiksoj sidas ĉapitreto sub "Gramatiko." Ĉi porinfane pritraktas la simplan verbotempon, jen ĉio. La verketo estas senmetoda kaj mankoriĉa. Mirinde, ke ĝia eldoniginto, s-ro Gladstone Solomon, ne pli trafe ĝin nomis, Unua Leglecionaro Porinfana, aŭ Enkondukaj Lecionoj en Esperanton. 9. Ne estas

lecionoj je (en) dimanĉo. 22. Ne manĝu verdajn pomojn denove (neniam plu) 24/28. Tie estas multaj belaj glanj (multe da); 46. J. lernis ĉi tiun poemeton post 5 min. ("en la daŭro de, aŭ, antaŭ ol pasis"); 49. Iun tagon J. havis malbonan kataron. (fortan malvarmumon?); "Floti." Konsilinde estas, ke oni uzu nur oficialajn radikojn en lernolibro. 67. Estas plaĉe, rimarki distingon inter "devas ne" kaj "ne devas." 68. "pojn-horloĝo" (!), aŭto (aŭtomobilo). "ĉiuj la musoj"; grava difekto precipe en lernolibro.

Prezo 1/6 ĉe BEA.—(Robo).

PRI LA SUFIKSO „END“.

La sufikso -end' ankoraŭ ne estas oficiale aprobita, tamen jam nun tiom multe uzata (eĉ en rondoj lingve tre konservemaj), ke supozeble la oficialigo okazos baldaŭ.

Parenca al -end' estas la finaĵo de la pasivo -ot'. Komuna ĉe ili estas la fakto, ke ambaŭ estas direktitaj al la estonto kaj ambaŭ estas pasivaj; diferenco estas, ke -ot' konstatas simple la fakton, ke io baldaŭ okazos, -end' kontraŭe enhavas neceson, devigon. Ekzemploj: La letero estas skribota; mi konstatas, ke post iu tempo mi skribos ĝin, sed ne diras, ke tio ankoraŭ certe okazos. Por pravi tion mi diras: Kiam la letero estis skribota, mi konstatis, ke mankas al mi ideoj kaj mi rezignis. Sed se mi diras: La letero estas skribenda, tiam mi konstatas, ke pro iu ekstera deviga kaŭzo mi devas ĝin fari, per aliaj vortoj: La letero estas nepre, certe skribota. Alia ekzemplo: La kotizo estas pagota komence de la jaro; tio signifas, ke mi simple konstatas la fakton. La kotizo estas pagenda; mi asertas, ke mi devas ĝin pagi, se mi volas resti membro.

Do la difino por -end' estas jena: Ĝi signifas, ke io devas esti necese farata en baldaŭa estonteco. Rememorigi necesas, ke -end' havas nur pasivan sencon, do sekve estus erare diri: Mi estas skribenda leteron; ĉar la letero estas skribenda.

Oni povas formi jenajn derivaĵojn: Multaj farenaĵoj min atendas. Oni

ĉiam prezentis al ni la imperiestron kiel adrendulon. Longe mi hezitis, sed nun la afero plenumendiĝis; kaj simile.

(El "La Socialisto," Vieno)

LA ĈINA LINGVO.

Unu el la plej malfacilaj lingvoj en la mondo estas la ĉina lingvo. Ĝi estas unusilaba, t.e. la radikaj vortoj konsistas el unu silabo kaj tiuj ĉi vortoj estas neŝangeblaj, ĉar la ĉinaj vortoj ne havas la diferencon inter ununombro kaj multenombro kaj ankoraŭ ne havas konjugacion aŭ deklinacion. La sama vorto krome povas esti substantivo, adjektivo, verbo, adverbo; tio tute dependas de la loko en la frazo.

Fari novajn vortojn per prefiksoj aŭ sufiksoj estas neebla en la ĉina lingvo. Plie estas la nombro da radikvortoj ne tre granda; ĝi varias inter proksimi mume 450 kaj 700, laŭ la dialekto.

Sed kiel oni povas esprimi siajn pensojn per tiel malmulte da vortoj? La malriĉeco je vortoj estas kompensata de la diversaj tonoj, laŭ kiuj oni prononcas la vortojn. La sama vorto povas havi kvin ĝis ok signifojn se ĝi estas dirata laŭ alia tono. Pro tio ankoraŭ oni ne parolas la ĉinan lingvon, sed kantas ĝin.

Kompreneble ekzistas en lando, tiel vasta kiel Ĉinujo, multaj dialektoj. La diferenco inter ili estas tiel granda, ke ĉinoj el la suda parto de la lando ne komprenas la loĝantojn de la norda parto, kaj okazas eĉ, ke anoj de la sama provinco, sed loĝantaj en diversaj urboj, ne komprenas unu la alian.

KIAL LA AŬSTRALIAJ INDIGENOJ RESTIS SOVAGAJ.

Kial propra civilizacio ne evoluis ĉe ili? Pastro Love, misiisto en okcidenta Aŭstralio, asertas, ke naskiĝo de ia civilizacio estis ĉiam ne-ebla ĉe la indiĝenoj de Aŭstralio.

En primitiva Aŭstralio ne ekzistis manĝeblaj, kultiveblaj vegetaĵoj, per kiuj povus vivi granda popolo. Ne ekzistis bestoj, kiujn oni povus utiligi je la terkultivado kaj simila laboro.

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Mangkreskaĵojn kaj brutojn nur la blankhomoj enkondukis en historia lastatempo. La nigruloj devis pene vivadi en mizera kaj malsatiga lando, kies nenia loko povis provizi nutron dum eĉ longeta tempo; ili do devis konstante vagadi, serĉante la vivrimedon. Ankaŭ la virinoj, pelate de la vivbatalo, ofte devis fari longajn piedirojn en malfacilaj vojoj kaj severa vetero, kaj tial ne disponis sufiĉe la tempon necesan por la sana edukado de infanoj. Infanoj foje detruigis, ne pro manko de gepatra moralsento, sed ĝuste pro kruela devigeo de la sorto.

Kesume, ia indiĝenoj ne povis plenigi sian landon per grandnombra loĝantaro; ili ne povis loksidiĝi en la daŭro de sufiĉe longa tempo por ellaboradi al si stabilan socion. Male ili dis-erigis en diversajn tribojn, kiuj parolis tute malsamajn lingvojn. Primitivaj homoj ili restadas ne pro malalta inteligento, sed tial, ĉar mankis al ili oportuna vivmedio taŭga por ebligi ilin atingi nivelon de mensa kulturo kaj civilizacio egala al tiu de aliaj popoloj.

HOMOJ DE LA SOVAGEJO

kaj iliaj fidelaj hundoj.

el "The Sun" (Sydney) de la 1a de Majo, 1926.

El la Angla lingvo tradukis George Gordon, F.B.E.A.

Oblikve falantaj radioj de la suno donis kuprecan brilon al soifanta ebenaĵo. Pro la varmego la aero super "claypan" (1) trembrilis kiel dezerta fata-morgano.

Oscedis grandaj fendoj en la tero, kaj sub la nepalpebrumanta rigardego de la suno la senmove staranta akvo jam malpliigis ĝis bruna lageto, brilanta kiel Ciklopa okulo en la flava ebenaĵo.

Proksime de areto da polvokovritaj "cotton-bushes" (2) armeo da "soldat' formikoj" kaj "buldog' formikoj" (3) avancadis, malfaldiĝadis en linion, retiriĝadis. El ĉiu fendo en la sunbruligataj deklivoj de la kava tero venis tiuj ŝvelaj, anasirantaj, brunaj insektoj.

Tra la subteraj koridoretoj kaj galerioj de la formikejo apud la tonto de la rivero Barcoo antaŭe zumis la vorto, signalo, senfadenaĵo, flustro aŭ kio ajn, per kio la formikoj interkomunikigas. Apude troviĝis mangaĵo, kaj la formika armeo amasiĝis por la testeno.

Sub la ardanta suno kusis "swagman" (4) spasme spirante, senĉapela, senbota, malsatega, preskaŭ mortanta.

Tiu bruna kvazaŭ vivanta tapiŝo minace avancadis al la disetenditaj brakoj de la kuŝanta homo, dum ree kaj ree batialis sur ĝin unu vila piedo de fidela hundo, kiel sur grenspikojn falas draŝilo. Polvo leviĝis, branĉetoj kraketis, sekaj folioj dispeciĝis. Ree kaj ree retiriĝis tiu bruna tapiŝo de morto kun ŝiritaj, ĉifonitaj franĝoj, kaj post ĝi restis polvovestitaj kadavroj, en la flavan teron batitaj de la vila piedo.

Brilante sub la sunaj radioj, tiuj brunaj batalionoj ree kaj ree avancis al la vojaĝlacaj kruroj kaj ilia ĉifonita, katuna pantalono. Sed ĉiam peze sur ilin batialis la vila piedo en disflugigo de polvo. La batalionoj disrompiĝis kaj torkuris, lasante post si sennombro da disbatitaj kadavroj. De tempo al tempo tra la nebuleco, kiun naskis la varmego, ĉis altatona bojeto, kaŭzita parte pro spito al la atakantoj kaj parte pro timo pri la suferanta mastro.

Tiamaniere dum longaj varmegaj horoj Spider, malgranda "Kelpie" (5) defendis sian mastron kontraŭ la atakoj de la formika armeo.

Kelkajn mejlojn sur la sunbakita ebenaĵo du aliaj vojaĝantoj sekvis la paŝosignojn de grandaj botoj kaj malgrandaj piedoj. La linio de paŝosignoj perdiĝis inter la aroj da "cotton-bushes," kiuj kvazaŭ gardostaris super la "claypan" for de la ĉefa vojstreko, kondukanta de Springside al la rivero Barcoo. Tamen troviĝis signoj, kiuj ŝajne kondukis la du vojaĝantojn al tragedia sceno. Unue troviĝis boto, due malplena akvosako, trie ĉapelo, kvare sako de mangaĵo, kvine dua boto, kaj fine polvokovrita "swag." Ĉio tio ŝajne signis la vojiradon de iu soleca

PERCY HOLMES

ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

"swagman" al lia morto sub la seninduiga suno. Trairinte la aron da "cotton-bushes" en tiu varmega posttagmezo ili trafis tiun ekzemplon de hunda fideleco apud la bruna "claypan."

Neniam sciiĝis, kiel longatempe Spider rebatadis tiun brunan armeon da kruelegaj formikoj. Ĝi obstine eltenis; la malgrandaj okuloj ekflamis, la felo hirtiĝis, la dentoj ekbrilis. Ĝi ree kaj ree saltis trans la sterniĝintan korpon de la mastro, kaj per sia mortiga piedo frakasis la antaŭgvardiojn de la formika armeo ĉiufoje, kiam ili kuregis trans la seninsektigitan spacon por ataki la senfortiĝintan kuŝanton.

Spider faris polvan, neŭtralan zonon ĉirkaŭ la "swagman," kaj en tiun zonon venis neniuj formikoj krom tiuj, kiuj agonianta sin tordis en la polvo. Daŭre de horoj la malgranda hundo sopiris al trinko. En distanco de kelke da metroj estis akvo, tamen neniam la hundo sin movis for de sia gardostaro ĉe la mastro. Nur tiam, kiam venis helpo, kaj oni levis la mastron el la rondo de minacantaj formikoj, Spider volis trinki. (finota)

TERMOMETROJ.

(El Verdkata Testamento de R. Schwarz).

Se vin mallaŭdas la kritiko,
Se vin atakas konkurenc',
Se kalumnias vin amiko,
Nu, ĝoju pri la konsekvenco,
Ĉar ĉio tio ja signifas,
Ke vi vivas !.....

Se bonon pri vi ĉiuj diras,
Kaj nur parolas pri merit'
Se ĉiuj ŝajn-sincere miras:
"Ho kia viro ! kia spirit'"
Videble oni florojn portis,
Ĉar vi mortis !.....

ITALIAN OR ESPERANTO?

Charles is writing:—...filo, caro, via, frate, presi, doni, ero, servo, due, tre, io, sono, prete, lui, ago, male, volo, peli.

Peter: I am indeed glad, Charles, to see you learning Esperanto.

Charles: Esperanto! Why, I'm doing exercises in Italian.

(Translation of the above Italian words, which are also Esperanto forms with different meanings:—fadeno, kara, vojo, monako, (mi) prenis, donacoj, (mi) estis, servisto, du, tri, mi, estas, pastro, li, kudrilo, malbono, flugo,

haroj).

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duanlundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Me'burna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB.E.A. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.